



Boletín

Nº 344 januaro/februaro 2000



Zamenhofaj ridetoj

Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

INTERNATIONAL FEDERATION OF ESPERANTO

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

Ĉefredaktoro: Miguel Gutiérrez Adúriz;
Los Coterros 1-C, 2-I; ES-39600 Muriedas;
Cantabria; liven@nexo.es

Kunlaborantoj: Salvador Gumá, Miguel
Fernández, Vicente Hernández, Andres
Martín, Luis Serrano, Antonio Valén, Anto-
nio Marco.

*Noto: Pri la enhavo de la artikoloj
respondecas la respektivaj aŭtoroj. La
redaktisto rajtas rifuzi ne petitajn artikolojn.*

Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7;
ES-28015 Madrid;
Tel.+faksilo: +34.(9)1.446.80.79
Konto: 14.011.966, Caja Postal
admin@esperanto-es.org
www.esperanto-es.org

Estraro

Prezidanto: Miguel A. Sancho.
Vicprezidanto: José M. Galofré.
Sekretario: Manuel Parra.
Kasisto: Pedro Garrote.
Vicsekretario: Marcos Cruz.
Voĉdonantoj:
Luis Hernández,
Augusto Casquero,
Miguel Gutiérrez.

Enhavo

Estrarkunsido	2
RENFE (<i>Ana Manero</i>)	3
Ĉio en ordo (<i>M. Zocato</i>)	3
Malfermiĝas pordo (<i>M. Parra</i>)	4
Niaj membroj en 1999	5
D.E.I	5
Niaj Grupoj kaj Asocioj	6
Donacoj	11
Emas korespondi	15
Instruado	16
Ĉirkaŭ la mondo	18
Manifesto 2000	19
Forlasis nin (<i>A. Casquero</i>)	20
Komuniko de la Akademio	20
Hispano elektita	21
Denove! (<i>Miguel Gutiérrez</i>)	21
Premio Klara Silbernik	22
Lingva Angulo (<i>A. Valén</i>)	24
Olafo	25
Polemiko	27
Esperanto en vortaroj kaj verkaroj (<i>Jorge Camacho</i>)	28
Jen aperis	28
Survoje	29
Literaturo: Rafael Alberti (<i>M. Fernández</i>)	30
Loĝado	31
Kongresa aniĝilo	32
Daŭre kreskas la nombro (Luis Serrano)	D

Estrarkunsido

La HEF-estraro kunsidis en la sidejo de la Asocio la 13an de novembro de la 10a horo. Ĉeestis: Miguel Ángel Sancho, Pedro Garrote, Manuel Parra, Luis Hernández, Miguel Gutiérrez, Marcos Cruz, Augusto Casquero, Ana Manero kaj pluraj aliaj kunlaborantoj.

Priraktitaj aferoj:

1) La sekretario laŭtlegis la protokolon de la antaŭa kunsido (B-tin 342). En rilato al la sesa punkto, la sekretario informis ke la problemo solviĝis. Oni aprobis la protokolon.

2) Ĝisdata plenumo de la buĝeto-1999. La kasisto informis ke antaŭvideblas defcito de proksimume 300.000 ESP.

3) Libroservo: Luis Hernández informis ke la vendado de libroj daŭre malkreskas. Ni detale analizis la kaŭzojn kaj eblajn solvojn; indus ŝanĝi la labor-manieron, sed ni decidis atendi ĝis plene funkcios la nova monunuo. Rafi Uruña kaj Luis Hernández anoncis ke tiam (junio-2002) ili lasos tiun servon. Ankaŭ ni debatis ĉu konvenos akiri ĉe Agencia Tributaria la


rajton por disvendi librojn (Licencia Fiscal); ni decidis resti ĉe la ĝisnuna situacio. La kontoetato de HEF do ne inkluzivos la kontoetaton de Libroservo.


4) Manuel Pancorbo raportis pri liaj demarŝoj en Berlino kiel reprezento de HEF. Pri helpo al Hispanameriko, Sancho sendu al Kuba E-Asocio nian triptikon por ke ili libere reeldonu ĝin. Augusto okupiĝos pri nia eventuala interveno en Santiago de Compostela, eŭropa kultura ĉefurbo en 2000. Pri Eŭropa Esperanto-Unio, Pancorbo informis ke HEF devas kotizi al ĝi kvaronon da eŭro por ĉiu HEF-ano; EEU financas inter aliaj la agadon de la brusela laborgrupo. Ĝi kongresos en Oostende, koincide kun nia

nacia kongreso. Luis Hernández partoprenos kiel reprezentanto de nia Asocio, kaj ni serĉos prizorganton por la libroservo de nia kongreso.

5) Buĝeto por 2000: Sancho proponis eldoni novan propagandilon, grandan faldfolion, por uzi ĝin en la venonta Expolingua. Ĝia kosto estus 250.000 ESP. Oni aprobis la proponon, kun la sindeteno de Pedro kaj la opono de Augusto, kiu trovis ĝin tro

kosta. La kasisto ellaboros proponon de buĝeto kaj alportos ĝin en la sekva kunsido.





RENFE

La organizantoj de la venonta HEF-kongreso atingis de RENFE ĝian apogon tiel, ke tiuj, kiuj vojaĝos al la kongresloko per trajno ricevu 30% elcentan rabaton ĉe la aĉeto de bileto.

Jen ĉerpaĵo el oficiala komunikado:

“Atendiendo a la solicitud cursada me complace confirmar que RENFE colaborará con la Federación Española de Esperanto, aportando sus medios, y ofreciendo las máximas facilidades de viaje a todos los asistentes y posibles acompañantes.”

La rabaton oni povos atingi por jenaj trajnoj: longaj linioj (grandes líneas), regionaj kaj ĉirkaŭajaj (ne por AVE aŭ Talgo 200) en naciaj itineroj, per prezentado de dokumento kiun la organizantoj siatempem havigos al interesigantoj. Ĝia validperiodo estos de la 24a de aprilo ĝis la 6a de majo, por iraj aŭ ir-revenaj biletoj, kaj la nura kondiĉo estas ke la vojaĝo finiĝu aŭ komenciĝu en la kongresloko.

Ana Manero

6) Hispana kongreso en Castellón: Augusto plendis pro la negativaj komentoj subskribitaj de Luis Hernández en la revuo de la grupo “Fido kaj Espero”. Augusto klarigis la organizajn problemojn okazintajn malgraŭ la tre laŭdindaj streboj de la organiza skipo. Ankoraŭ oni demarŝos por finatigi la petitajn subvenciojn. La HEF-prezidanto danke leteros al la organiza skipo.

7) Kongreso-2000: Ĝis nun ne estis decidita la preciza loko por ĝi. La madrida skipo daŭre demarŝas. Ni ellaboros reglamenton kun la minimumaj kondiĉoj por organizi kongreson de HEF, kiel postulas la 33a artikolo de nia statuto. Espereble en la venonta ĝenerala kunsido ĝi povos esti diskutata kaj aprobata. Gutiérrez anoncis ke la kantabra grupo pretas organizi la hispanan kongreson en 2005.

8) ILEI: Ni formale petos al ĝi la liston de la hispanaj membroj, por instigi ilin starigi la hispanan sektion de ILEI.

9) M. Gutiérrez esploras la koston reeldoni “Nuevo Método de Esperanto”, de F. de Diego.

10) Laŭ propono de la kasisto, ni decidis aĉeti komputilan programon “Contaplús Élite” por adekvate teni la kontojn laŭ la leĝaj postuloj. Ĝia prezo estas 127.000 ESP.

11) HEF jam rezervis standon por Expolingua-2000.

Neniu el la kunvenintoj ricevis, ĉar ili ne petis, monkompenson pro la veturado.

La Prezidanto, Miguel Ángel Sancho
La Sekretario, Manolo Parra

HEF

www.esperanto-es.org

Ĉio en ordo

En la Estrarkunsido okazinta en Castellón, nia sekretario informis, kun maltrankvilo, pri tio ke la Ministerio pri Internaj Aferoj komencis proceduron por nuligi la deklaron de publika utilo de nia Asocio, pro pluraj formalaj difektoj en la prezentita dokumentaro (vd Bol. 342).

Feliĉe, HEF trovis kaj korektis la diritan eraron en la kontoj (diferenco de 4.103 ESP), ellaboris informon (*Cuadro de financiación*), kaj prezentis ĉion ĉe la Ministerio pri Internaj Aferoj, kiu respondis jene:

“...Examinado su contenido, como los documentos aportados posteriormente a requerimiento de este Departamento, y comprobada su adecuación a la normativa vigente, (...) se acuerda el depósito de la Cuentas en el Registro Nacional de Asociaciones, a efectos de constancia y publicidad.

Asimismo, se acuerda la terminación del procedimiento de revocación iniciado, y el mantenimiento de la condición de utilidad pública que ostenta la Entidad. (...)”

Ni spiru do trankvile!

M. Zocato Diez

Malfermiĝas pordo

Aperis pozitiva artikoleto pri esperanto en la semajna gazeto *Mercado de trabajo* (12.11.99, 18a paĝo). Fakte, la 8an de novembro vizitis la HEF-ejon Ignacio Arroyo, ĵurnalisto de tiu revuo, kiu aperas ĉiuvendrede en kioskoj de la regionoj Aragono, Madrido, Kastilio-Leono kaj Kastilio-Manĉo. Dum kvaronhoro nia sekretario s-ro Manolo Parra respondis ĉiujn demandojn de s-ro Arroyo pri la lingvo, la asocio kaj la perkoresponda kurso, montris la materialon de la kurso kaj donis al la ĵurnalisto po unu ekzemplero de niaj kutimaj informiloj. La ĵurnalisto, homo juna kaj laŭŝajne kun pozitiva intereso, asertis ke li metos anoncon aŭ raporton en la numero aperonta ĉi vendrede 12an, kaj ke li sendos al ni ekzempleron. Cetere li petis ke oni akurate informu (ĉirkaŭ 10 tagojn antaŭe) la revuon pri komencotaj ĉeestaj kursoj en iu ajn urbo de la diritaj regionoj.

Jen la datumoj: Ignacio Arroyo Figaredo; revista *Mercado de trabajo*; Sebastián Elcano 25, 28012 Madrid; tel-oj: 915 399 956 / 610 787 522; fakso: 915 398 015; retpoŝto: ignacioarroyo@upn.es

Manolo Parra

Memoru ke vi povas legi ĉiutage la lastajn e-novaĵojn pere de Interreto en Agora.
www-ciudadfutura.com/esperanto
(kliku sur Foro Agora)
aŭ tra:
www.esperanto-es.org

Fundación Esperanto

Helpas la movadon per sukaj subvencioj.
Aldonu via brikon al la konstruado de pli forta movado en Hispanio kaj sendu vian kontribuon al IberCaja (Zaragoza):
2085-0101-13-0128624762

Niaj Membroj en 1999

En 1999 forpasis 7 HEF-anoj, 6 ekŝiĝis kaj 4 estis ekŝiĝitaj pro nepago.

Jen la listo de novaj membroj:

Juan Pablo Carmona . . . Almeria
David Carrero Herencia
Luis Adolfo Ciges Madrid
José Luís Cruz Madrid
Francisco de la Calle Madrid
Antonio Gálvez Barcelona
Carmen García Murcia
Yolanda Garrido Madrid
Jacinto González Alicante
Mari Trini Grande Madrid
Carmen Guerra Huesca
Fernando Latre Ibiza
Victor Julio Maestro Valencia
Iván Manso Madrid
Gemma Martí Tarragona
Pilar Martín Segovia
Ana Martínez . . Aranda (Burgos)
Hélène Michoux Madrid
Antonio Rodríguez Alcorcón
Miguel Roselló Málaga
José María Salguero . Don Benito
Celso Sanchez Murcia
Antonio Sarmiento . . Las Palmas
Eduardo Segura Lorca
Robert Tolosa Igualada
Luís Ignacio Traver Madrid
Antonio Trigo . . . A. de Guadaira

D.E.I.

D.E.I., t.e. konto de Donacoj por Ekstera Informado estas propono naskiĝanta en la novembra Estrarkunsido de HEF.

Per la nunaj enspezoj la asocio sukcesas kovri siajn internajn bezonojn, sed... kio okazas rilate al la ekstera agado? Ĉu ni NE informu al la publiko pri Esperanto?

Nu, post detala analizo de la financa evoluo en la lastaj jaroj la estraro alvenis al la konkludo ke, por daŭre aliri la publikon en deca maniero, HEF bezonas pli da elspezoj kiuj, en la nunaj cirkonstancoj, povas veni el esperantistoj sufiĉe konsciaj pri la graveco de tiu agado. Nur ilia kontribuo helpas diskonigi Esperanton inter la ĝenerala publiko. Tial do HEF starigis DEI.

Jen la unuaj alvenintaj kontribuoj:

Pedro Garrote	5.000
Luis Hernández	10.000
Miguel A. Sancho	5.180
Rafaela Uruña	15.000
Ana Manero	5.000
Marcos Cruz	5.000
Ĝisnuna sumo	45.000

Se vi opinias ke la Ekstera Informado estas grava, kontribuu pere de la bona konto de HEF: n-ro 14.011.966 Ĉe Caja Postal, klare indikante "D.E.I."



Niaj Grupoj kaj Asocioj

Andaluzio

* La pasintan 11an de decembro AEU, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, okazigis en Granado la kutiman kunvenon okaze de la Zamenhofa Tago. Renkontiĝis deko da gesamideanoj el la urboj Malago, Seviljo, Almerio kaj Granado mem. Post vizitado de kelkaj urbaj vidindaĵoj, ĉiuj iris manĝi ĉe tipa restoracio. Kompreneble, oni profitis la manĝadon por pritrakti interesajn aferojn por la vivo de nia asocio.

Oni parolis pri la korespondaj kursoj kaj pri la monata radio-programo dissendata de AEU el la Suna Marbordo. La sevilaj samideanoj menciis siajn kontaktojn kun la ticia Universitato por organizi estonte prelegojn aŭ eĉ kursojn pri la internacia lingvo. La Prezidanto de AEU, S-ro Andrés Martín, parolis pri la ebloj disvastigi E-on pere de radio-programoj kaj li invitis al ĉiuj ĉeestantoj kontakti lokajn radio-elsendejojn por produkti programojn pri Esperanto.

La Prezidanto, same, informis pri la nova servo de AEU kiu ebligas al ĉiuj membroj de la asocio ricevi, pruntedone, la librojn de la biblioteko de la asocio. Entute estas pli ol cent titoloj kiuj nun estas je la dispono de la AEU-anoj ĉe ili mem.

Fine, oni memoriĝis al ĉiuj la neceson plialtigi la nombron de la membroj de nia

asocio kaj ankaŭ la konvenon kunlabori ofte kun nia trimonata organo Gazeto Andaluzia.

José María Rodríguez

Apartan intereson inter e-istoj de diversaj landon vekis la informo pri la agado de Alejandro Iglesias ĉe la "Jornadas de Redes Europeas de Jovenes". (Boletín 343)

Alejandro estas juna samideano de vilaĝeto apud Tarifa en la provinco Kadizo kiu respondecas ene de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo pri rilatoj kun blindulaj asocioj, ĉefe kun O.N.C.E. Li, homo tre aktiva, respondecas ankaŭ pri *Euroclub*, asocio kun sidejo en sia vilaĝo. Danke al tiu asocio li malfermis pordojn por Esperanto plurloke. Eĉ en la revuo eldonita de tiu asocio, kie li aperigas E-paĝon.

M. D. Z.

* Ĉe la TTT-ejo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo auskulteblas la lasta programo "Trarigardo de E-Gazetaro", de Radio Polonia. Temas pri la elsendo de la 4a de decembro, kiu pritraktas la revuojn Esperanto kaj Boletín de HEF. Cetere, jam legeblas la decembra numero de Gazeto Andaluzia.

José F. Martín

* Atentu! Jen la nova poŝtadreso de AEU: Andrés Martín González; Asociación Andaluza de Esperanto; Apartado 864; 29080 Málaga;

Retadreso: andresper@teletel.es

Aragono

* Kiel ĉiujare en oktobro, komenciĝis en Frateco elementa kurso. Dume la Asocio kopodas organizi alian en la Universitato. Cetere s-ro Antonio Marco okupiĝos ĉiujare pri duhora ĉiusemajna konversacia rondo.



Marco Botella kaj lia edzino kune kun la prezidanto de Frateco, Victor Ortiz (dekstre) okaze de la omaĝo al nia antaŭa redaktoro

* La naskiĝdatrevenon de Zamenhof oni celebris unufoje en la oficiala nova sidejo de la asocio la 15an de decembro. Kun dolĉaj kukoj, diversaj frandaĵoj kaj bongustaj trinkaĵoj, oni tostis honore al la Majstro kaj al nia nova ejo.

Tri tagojn poste, t.e. la 18an, ĉe restoracio Zeus, oni ĝuis eksterordinaran tagmanĝon, kiu finiĝis je la sesa vespere. Nekonata "fratecano" premiis la intensan laboradon de kelkaj lokaj samidenaĵoj en la adekvatigo de la grupa sidejo, regalante la kunmanĝantojn per malavara pluso en la kvalito de la mendita menuo. Ekzistas pli da dankemaj homoj ol oni pensas!

* Ankoraŭ ni ne inaŭguris la novan sidejon, ĉar la prepar-laboroj daŭras: oni konstruis magazeneton en la korto kaj komencis ordigi tie kestojn kun revuoj, dokumentoj kaj aliaj esperantaĵoj. Cetere, kvankam mi klasifikis ĉiujn dokumentojn kiuj antaŭe disis en plej diversaj lokoj ekde la jaro 1908, ankoraŭ mankas la ordigo kaj kontado de ĉiuj libroj de la biblioteko. Post la muntado de nova luksa planko, nun oni volas ŝanĝi ĉiujn kvin pordojn de la ejo, instalii novan elektran lum-sistemon ĉe la



ŝtuparo, ktp. Mi ne scias ĉu mankos mono en la fundo de certaj poŝoj, ĉar la ideoj floras pli kaj plu...

Antonio Marco

Asturio

* En Radio *Sele* ("milda" en la astura lingvo), radiostacio kiu dissendas laŭ modulita frekvenco ĉefe en la astura lingvo (*bable*), Abelardo González prezentas,

ĉiumerkrede je la 19a horo, programon dediĉitan al Esperanto. Fakte jam intervenis en la programo pluraj membroj de la estraro de Astura Esperanto Asocio.





Inaŭguro de placeto en la parko



La bankedo en Avilés

* Ĉi jare la Grupo Antaŭen, de Avilés, organizis la Zamenhof-feston en nia regiono. La programo, kiun ĉeestis 37 homoj, konsistis el pluraj eroj. Unue E-lingva meso en la kapelo *Jesuso de Galilao*, Poste simbola inaŭguro de placo dediĉota al Esperanto, en la plej grava parko de la urbo. Kaj fine, kiel kutime, aĉetado de libroj kaj partopreno en frata bankedo en restoracio *La Estaca*.

En la preparado de la programo intervenis entuziasme, kiel ĉiam, la Prezidanto kaj fondinto de la E-Grupo Antaŭen, Nicolás Muñiz. Los festeroj disvolviĝis normale, sed malfeliĉe nia samideano ne povis partopreni en ili. Ĝuste la antaŭtago de la festo li suferis infarkton. Laŭ esprimita deziro lia kaj de lia familio, oni plenumis la planitan programon.

Finiĝinte la meso, en kiu oni preĝis por la sano de Nicolás, delegitaro iris al la hospitalo, kie li troviĝis; tie oni informis ke la malsano estas mortdangera. Ĝuste tiutage, amtaŭ la finiĝo de la bankedo, forpasis nia amiko Nicolás Muñiz, la homo sur kies sindediĉo kaj idealismo baziĝis la ekzistado kaj funkciado de la avilesa E-grupo, kaj kiu fordonis sin ne nur al Esperanto sed ankaŭ al aliaj kulturaj iniciatoj de sia urbo.

Ni memoras kaj omaĝas lin; kaj esprimas nian kondolencan al lia familio, ĉefe al María Luisa, lia edzino kaj esperantista kunlaborantino.

Faustino Castaño



Salguero (centre-sube) kun sia lernantaro

Ekstremaduro

* La "Fundación de Estudios Sociales Extremeños Pío Sopena" organizis du fulmajn E-kursojn. Tiu fondaĵo ne nur disponigis sian ejon sed ankaŭ pagis la koston de la uzitaj lernolibroj: *Esperanto. Curso del idioma internacional* de Miguel Gutiérrez. La unua kurso okazis dum la dua, longa, semajnfino de oktobro kaj la dua

kurso okazis de la 4a ĝis la 8a de decembro en Hervás, belega montara vilaĝo de Cáceres. En la dua partoprenis 18 homoj el Ekstremaduro, Valencio, kaj Murcio en du grupoj: komencantoj kaj la progresantoj de la unua kurso.

* Kontakto-leteron estis dissendita al 30 interesigantoj de la regiono kun la celo organizi amikan reton.

José María Salguero



Julio Argüelles dum vizito al Bilbao



En Bilbao la festo okazis en la grupejo

Eŭskio

* Kiel anoncite, la sabaton 18an de decembro, ni celebris en nia sidejo de Bilbao la Zamenhof-tagon. Rimarkindas la ĉeeston de nia valenci-londona amikino Ana Montesinos kaj la fakto ke ni ĝuis veran internacian etoson.

HEF-Bulteno n-ro 344

Mallonga parolado de nia samideano Eduardo Larrouy enkondukis salut-vortojn de kelkaj gastoj: Ana Montesinos, kiu restis dum tri tagoj en Bilbao; Malgorzata Jonkisz, polino loĝanta apud Bilbao de antaŭ kelkaj jaroj; kaj Jolanta Poprawska, ankaŭ polino kaj ankaŭ loĝanta apud Bilbao de antaŭ 2 monatoj.

Post kuraĝigaj vortoj de la parolantoj, longe ni babilis ĉirkaŭ tablo plenplena de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Poste kvar el ni eĉ ĉeestis du dancejojn por daŭrigi la festotagon.

* Kiel kutime, loteri-premioj ne trafis nian E-Grupon, sed ni ne perdis la esperon iam fariĝi riĉuloj.

* Monto-ekskursoj daŭras: en novembro ni iris al Dobro (Burgos), sed estis tiom da neĝo kaj nebulo ke ni devis rezigni pri grimrado al la monto. Tamen, danke al tio, ni povis gustumi varman kaj bonegan manĝon ĉe restoracio de Villarcayo.

En decembro, ni ekskursis al Pico de la Cruz (Kantabrio), sed denove pluvis kaj malvarmis; kantabraj geesperantistoj ne alvenis kaj, post mallonga piedrado, ni revenis hejmen.

J. Miguel García Iturrioz

* Estas tuj aperonta la traduko de konata eŭska verko de la fama aŭtoro Bernardo Artxaga. Temas pri “Memorajoj de eŭska bovino”, *Belri euskaldum baten memoriak*, tradukita de s-ano Aitor Arana. Aparte interesa fakto estas tio ke la libron eldonas necesperanta grupo.

M. Diez Zocato



Kanariaj Insuloj

* Aperis dulingva bunte alloga inform-kajereto pri kvar el la Kanariaj Insuloj, La Palma, La Gomera, El Hierro kaj Tenerife, kies titolo estas “*Cuatro islas de ensueño — Insula Kvaro revinda*”. Eldonis ĝin ARIC (*Asociación de Radioaficionados e Invidentes de Canarias*). Kunlaboris




Kanaria Zamenhof-Festo

”Cabildo de Tenerife”, “Caja Canarias” kaj “Sociedad Esperantista de Tenerife”.

* La membroj de ESTO kunvenis en sia sidejo en la historia strato San Agustín de La Laguna. Inter aliaj aferoj, oni decidis apogi la universitatan kurson “Esperanto kaj ĝia kulturo”, kiun oni denove ofertis al la geestudentoj de la Universitato de La Laguna. La kurso okazos inter marto kaj junio de la jaro 2000, gvidata de prof. A. F. López de Vergara Méndez. La periodo por matriculiĝi estos de la 15an de februaro ĝis la 23a de marto. Cetere jam komenciĝis “seminario por progresantoj”, kies gvidanto estas s-ro José Luís Cruz García.

* La Laguna, urbo tre ligita al la esperanta movado en Kanarioj, estis deklarita de



Korea gasto vizitis la paradizan insularon

UNESKO "heredaĵo de la homaro" la 2an de decembro de 1999.

Leandro Trujillo Casañas



Ankaŭ la kantabroj festis la Z-tagon

Kantabrio

La 17an de decembro grupo el 15 ACE-membroj festis la tagon de la libro en Esperanto (Zamenhof-tagon). Unue, oni kunvenis je la 8a vespere en la sidejo de la asocio por babili, kaj poste oni translokiĝis al kafejo Palma por ĝui tre bongustan vespermanĝon.

P.U.L

Katalunio

* La E-Grupo Aŭroro de "La formiga" celebris kune la Zamenhof-tagon kaj sian 50an datrevenon la 19an de decembro. Unue oni omaĝis la forpasintojn de la asocio per meso en esperanto fare de pastro Manuel Casanoves. Poste, en la sidejo de la kooperativo *La formiga Martinenca*, s-ro

HEF-Bulteno n-ro 344



Donacoj

Aro da malavaraj madridaj esperantistoj, kundonacis al la HEF-biblioteko la video-kurson "Pasporto al la tuta mondo", verkitan de Paul Gubbins, kunlabore kun Stefan MacGill en la skrib-ekzercoj, kaj eldonitan de ELNA.

La kurso konsistas el 15 lekcioj. Ni ricevis la unuajn ok jam eldonitajn, kaj la ceteron ni ricevos tuj post ĝia apero. Ĉiu leciono okazas plene en esperanto. La kosto de la kompleto estas 240 eŭrojn. Certe la video-kurso riĉigas la stokon de instru-materialoj de HEF.

Ana Manero

*Memoru uzi por viaj donacoj al
Hispana Esperanto Federacio
la bonan konton:*

Caja Postal

14.011.966

Frederic Alberich prezentis la aranĝon. Prelegis s-ro Martí Guerrero pri la Z-festo kaj s-ro Luis Serrano pri "La tasko de la E-Grupo". Poste la ĉeestantoj ĝuis la prezentadon de *Ballet de la Formiga* kaj de la koruso *Núria*. Fine, per buso, ĉiuj translokiĝis al la strato *Doctor Zamenhof* por omaĝi la iniciatinton de Esperanto per florbukedo, kaj poste al Restoracio per frateca kunmanĝado.

M. Zocato Diez

—11

* La 29an de decembro okazis en la sidejo de Barcelona E-Centro (BEC) ekzameno la disdonado de diplomoj al la sukcesintaj kursanoj. Cetere, BEC eldonis triptikan informilon kun la celo inviti eventualajn interesitojn al E-kurso komenciĝonta en januaro. La 26an de januaro BEC havos sian Ĝeneralan Kunvenon.

ĜI de BEC

* La 30an de januaro okazos la Ĝenerala Kunsido de Kultura Asocio Esperantista (KAE) en *Centre Civic Creu Alta de Sabadell*. * “La mono” estos la temo de la “Babilado” okazonta en Premia de Mar la 16an de januaro.


* En la revuo *Eschrifts* (10, 32a p.), eldonita de CEDESC, aperis unupaĝa artikolo de la vicprezinto de HEF, s-ro Josep M. Galofré, pri Esperanto.



A. Rico, Platas, Lucrecia, Francisca

Madrido

* La madrida “movado” (kun la permeso de Camacho kaj malgraŭ la “malmovademo” de Lupe kiu suferis akcidenton en sia piedo) festis la



P. Garrote, geedzoj Flores, Angelita Lupe Sanz y Carmen Suarez.

Zamemhofan tagon pere de bankedo en la tradicia restoracio *Puerta de Toledo*. Ĉeestis 30 esperantistoj kaj simpatianoj, inter ili kelkaj el Valadolido kaj Valencio kaj eble la plej maljuna esperantistino de Hispanio: Lucrecia San Antonio (88 jarojn).

Lupe Sanz-Bueno

* MEL okazigos sian Ĝeneralan Kunsidon la lastan lundon de januaro (24an) en Rodríguez San Pedro 13-3°-7.


* En Kristnasko vizitis la HEF-oficejon e-istoj el Germanio kaj Nederlando. Ili parolis pri la e-movado en siaj landoj.

el *Nia Voĉo*

* Dana paro vizitis la CO-ejon de HEF la 22an de novembro, tagon kiam MEL-anoj kunvenas.

* Lundo, la 3an de januaro, vizitis la kunvenon de la Liceo D-ro Rainer Kurz, aktivulo de Germana Esperanto Asocio. Li prezentis belan prelegon kun lumbildoj pri sia urbo Stuttgart. Ankaŭ okazis interesa babilado inter li kaj la organizantoj de nia onta kongreso. Post vizito al pluraj hispanaj urboj, li ankoraŭ pasigis kelkajn tagojn en Madrido, kiel gasto de unu el la MEL-samideanoj.

MEL



Murcianoj amuze kaj pli serioze en la Zamenhof-tago

Murcio

* la 17an de decembro, dimanĉon, la geesperantistoj de Murcio tagmanĝis honore al Zamenhof. Preskaŭ dudek gesamideanoj ĉeestis. Ĉiu partoprenanto rivecis la *Premion Zamenhof*, kiun HALE ĵus kreis. Ĝi konsistas en la plej altkvalita artikolo aperinta en "Kajeroj el la Sudo" en la jaro, dulingve republikigita por la okazo. La originaleco de la premio kuŝas en tio, ke ĝin ricevas ne la gajninto, sed la tagmanĝantoj! Ĉi okaze la gajninto estis s-ro Giordano Moya Escayola, kaj la elektita

artikolo estis "Ĉu profito aŭ altruismo?", aperinta en la 41a numero (januaro de 1999).

* Jesuo de las Heras komencos instrui elementan E-kurson en la lernejo kie li instruistas meze de januaro. La lernantoj estas 14-jaraj studentoj.


* La 7an de januaro ni gastigis la Prezidanton de la Germana Esperanto Asocio, Reiner Kurz.

* Atentu ĉar ne plu funkcias la ttt-paĝaro <http://members.xoom.com/Jesuo>.

Tial, la ttt-paĝaro "Esperanto España", devis translokiĝi al <http://www.educar.org/Revistas/Esperanto/>.

Tie oni jam povas legi, kaj ankaŭ aŭskulti!, la 45an numeron de Kajeroj el la sudo".

Jesuo de las Heras



Kultura Arta Festivalo de Esperanto

De la 5a ĝis la 9a de julio 2000 en Tuluzo (Francio) okazos KAFE, *Kultura Arta Festivalo de Esperanto*. Petu paperajn aŭ retan informilon ĉe EUROKKA; FR-31450 Donnevile, Francio. Tel/faks: +33-561.81.95.95; Rete: eurokka@esperanto.org

intervjuita de li la 20an de decembro je la 11.20 horo dum dek minutoj. Li serioze trastudis nian retan informilon kaj prikomentis ĝin sufiĉe favore. Ne estis demandoj kia: "Kiom da esperanto-parolantoj estas en la mondo?" kaj similaj. Male, li interesiĝis eĉ pri la vortarego de De Diego.

Ana Manero

*Kiel oni diras en Esperanto *Feliz Navidad* (Feliĉan Kristnaskon)?

Jen la demando, kiun devis respondi paro de junaj konkursantoj en la konata televidprogramo *El Euromillón*, tagmeze prezentita de *Tele 5*. Kaj ili sukcesis, kvankam mi preferas ne paroli pri ilia prononcado.

M. Zocato Diez

Tutlande

* La revuo *Perfiles*, eldonita de la nacia organizaĵo de blinduloj O.N.C.E., aperigas jenan anoncon en sia numero de novembro-99: "La Fundación Esperanto ofreece subvenciones (hasta 350.000 ptas.) para cursos, estands, exposiciones y otras actividades cuyo fin sea difundir este idioma. Solicitudes hasta el 1 de diciembre. Fundación Esperanto, Apdo 3142, 14080 Córdoba. fundacion@esperanto.nu"

Manolo Parra

* "El Periódico" aperigis en sia angulo "leteroj al la Direktoro" informon pri Esperanto fare de la Vicprezidanto de Hispana Esperanto-Instituto.

* Traleginte la HEF-paĝaron, Nacho Toro, ĵurnalisto de Onda IMEFE, kontaktis la HEF-oficejon. Ana Manero estis telefone

Valencio

* Okazas E-kurso ĉe la C.E.P.A. "Reina Doña Germana", centro por konstanta edukado de plenkreskuloj, dependanta de la Konsilantejo pri Edukado kaj Scienco de *Generalitat Valenciana*. Ĉiu marde, po du horoj, de oktobro ĝis aprilo. Ĉeestas 10 gelnantoj kun tre alta kultura nivelo.

* La 20an de novembro, je la 20a horo, ĉe la Preĝejo San Fernando Rey de Valencia, okazis memora deservo por profesoro Félix Navarro Clemente, kiu forpasis 91-jara, la 30an de la lasta julio.

* La 11an de decembro, en la salonoj de *Centro Aragonés en Valencia*, oni festis la Zamenhof-tagon. Unue salutis Augusto Casquero nome de la Estraro. Poste okazis kortuŝa prelego fare de Juan Antonio Giménez, memore al nia forpasinta

samideano Félix Navarro Clemente. Post tiuj memorvortoj prelegis Pascual Pont pri la temo "La lingvo de la tero; ŝanĝo kaj skribado". Fine ĉiuj ĝuis abundan kaj bongustan bankedon. Ĉeestis trideko da samideanoj.

La 15a de decembro oni metis laŭrkronojn ĉe la memortabulo al D-ro Zamenhof, en la strato dediĉita al li en la valencia ĉefurbo.

* La folkloro ensemblo de *Centro Aragonés en Valencia* partoprenos en la Internacia Festivalo de Popolaj Orkestroj kun esperanta prezentado en la pola urbo Toran, en la jaro 2000. Tiun festivalon ili jam gajnis en 1998.

* la "11a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio kaj Murcio", okazos dum la 1a kaj 2a de aprilo 2.000, en la bela kaj historia urbo Requena (Valencia). Konstanta adreso: Avenida Burjasot, 29, A-31. 46009 — Valencia.

* "Mediterranea Kultura E-Semajno". Okazos en la Fakultato pri Filologio de la Valencia Universitato de la 10a ĝis la 15a de julio 2000.

Augusto Casquero

* Mi, Yoan F. Cuevas Pérez, kaj aliaj membroj de nia e-klubo deziras korespondi kun hispanaj e-istoj. Interesas nin Muziko, indiĝenaj kulturoj, ŝako, komputiloj, religio kaj kulturo generale. Adreso: apartado 65 Sancti Spiritus 60200 Kubo.

* Lázaro Manuel Llerena, 17 jara knabo, deziras trovi amikojn kaj korespondi pri ajna temo. Ne gravas aĝo, sekso kaj temo. Li pretas interŝanĝi poŝtmarkojn, glumarkojn, librojn kaj revuojn (ne grave ĉu en la hispana, ĉu en esperanto). Adreso:

KEF 2000

17—23.7.2000 en Helsinko, Finnlando

- *Koncertoj*
- *Komiksoj*
- *Poemoj*
- *Noveloj*
- *Teatraĵoj*

Ne enuu! Enamiĝu al kulturo!

Pliaj informoj:

www.esperanto.fi/kef2000.html

aŭ

*Kultura Esperanto Festivalo
Siltasaarenkatu 15 C 65
FIN-00530 Helsinki, Finnlando*



Emas korespondi

Fructuoso Rodríguez # 100c esq; Serafin Sánchez; Sto. Domingo — CP 5300; Villa Clara — Cuba.

* 43-jara vidvino, kies avo partoprenis en la hispana intercivitana milito, volas korespondi kun hispanaj virinoj. Jen ŝiaj nomo kaj adreso: Tatjana Sisojeva; prosp. Kolskyj 133-19; RUS-183052 Muzmansk.

* 20 geknaboj 10-,15-jaraj. Adreso Esperanto-Grupo "Ramón Molera" Palacio de los Pioneros" "Somos el Futuro". Avda. 21 e/ 10 y 12 Quivican; Habana; Cuba.

Interese

* Pri streĝoj en kastejo Grestillon informas: Marie-Therese Löttery, Villa La Pergola, 8 rue Banden 64000 PAU, Francio.

* 20 novaj esperantologoj diplomitiĝis en 1999 en la universitato de Torino, Italio.

Subvencio

Per oficiala komando de la 11a de novembro, la Universitato de Valladolid informis d-rino Katalicia Urteaga Alvarez la atingon de mousubvencio de 75,000 pfoj.


La subvencioj petis d-rino Urteaga kiel prelegantino, katre de IKU, en la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Berlino pri la temo "De la homnana helpo al la homnana interveno en la aktuala Internacia Juno".

La prelego de d-rino Urteaga kune kun la aliaj prelegoj de IKU estis broŝur-forme eldonitaj de UEA kaj mendebias ce L'Observo de HEF.
L. Hernandez



16—

Instruado



Katalunio

La 9an de novembro 1999, oni metis la finan punkton al Irmonia Ek-kurso en aŭlo de la Autonomia Universitato de Barcelono. Organizita de KAE (Kultura Asocio Esperantista), ĝi estis la unua itaspeca kurso en kataluna universitato. Sur la spulda foto aperas la KAE-pretzidanto, la du profesoroj, s-roj Guerrero kaj Rodríguez, kaj la dek gemanantoj, kiuj partoprenis la kurson kun kontentega rezulto.
J. M. Galloper

Madrid

La 10an de novembro 1999, la subprekoroj de la Autonomia Universitato de Madrido (*Universidad Autónoma de Madrid*) aprobis la situadon de studenta Esperanto-asocio kreita en tiu universitato. La nomo de la asocio estas studentoj pri filozofio, arĥivistaro, fiziko, ktp.

Krom la informado, prioritara agado de la nova asocio estas la instruado, riceble de Marco Treviŝan ĵam instruans Esperanton al grupo de studentoj en la universitato ĵamde kaj merkrate de la 12a ĝis la 13a horo.
Lano Diego

HEF-Bulleton n-ro 344

HEF-Bulleton n-ro 344



Valencio

Fakultato pri Filologio de la Valenciana Universitato: Kiel dum la lasaj kvar ĵajoj, ti ĵare oni petis ofratele pere de la Departamento de Germana Lingvo, okazigi denove Ek-kurson en aprilo, kun valoro de tri Akademiasj Kreditoj. Dum la lasaj kvar ĵajoj ĵam pli ol 200 gemanantoj ricevis la kreditojn kaj la atestadon pro la partopreno en la bezaj kursoj. Ĉi ĵare la celo estas organizi du grupojn, unu el novaj gemanantoj por la Bazca Kurso, kaj la alia por Prekŝuliga (Mezo) Kurso, nur el gemanantoj kiuj ĵam ĉesitis la Bazan. Entute, pro spaco-manko, oni akceptos nur 50 plus 50 gemanantojn, tio faras entute 100.

Augusto Casquero

Aventur

"Esperanto Studies Foundation" (Filianta al CED) sekvas ĵuradon por pagata bibliografio / arkiva taskaro. Interesiĝoj turnu sin al Humphrey Tonkin:
tonkin@mail.harford.edu

—17



Ĉirkaŭ la mondo

* — En majo de la jaro 2000, la redakcio de El Popola Ĉinio festos sian 50-jaran jubileon.

* — La ĉefa estro de framasanoj publike deklaris, la 12an de aŭgusto 1999, ke Framasanoj rekonas Esperanton kiel veran internacian lingvon.

* — La 5a klaso de la ĝenerala lernejo en Biksad (provinco Kovasna, Rumanio) partoprenis nacian konkurson, prezentante projekton “Interkulturo” de ILEI kaj UEA, en kiu ĝi partoprenas. Ĝia propono estas konsiderata la plej bona projekto kaj pro tio ĝi gajnis komputilan laborejon, konsistantan el 5 komputiloj kun ligo al interreto.

La 25 gelnantoj tre feliĉas, ĉar ili fariĝis la unuaj aliĝintoj al la tutmonda interreta virtuala lernejo Tibor Sekelj, kie nun partoprenas 92 klasoj el ĉiuj kontinentoj. Se vi deziras gratuli la gajnintojn leteru al: Shcoala Generala Nr.1; RO-4038 Bixad, Jud. Covasna, Rumanio.

* — Literatura Muzeo Petofi en Budapeŝto aperigis k-diskon kun 25 tradukoj en 20 lingvoj de la verko “Tragedio de l' homo”, verkita de Imre Madachn, inkluzive de la Esperanta versio, tradukita de Kolomano Kalocsay. La k-diskon, kiu ne estas aĉetebla, ricevis la pli grandaj naciaj kaj internaciaj bibliotekoj.

* — La germana hip-hop-muzikgrupo Freundeskreis (Amikaro) vendis 250.000 ekzemplerojn de sia k-disko “Esperanto”

kun kantoj en la germana kaj en Esperanto. Tial la grupo ricevis la premion “Goldene Schallplatte” (ora disko).


* — Uzbeka Esperantisto, Vladimir Shchotkin, kreis vakcinon por preventi zoonotikan haŭtan leiŝmaniozon, malsanon de kiu suferas ĉiujare proksimume 2 milionoj da homoj en Azio kaj Afriko.

* — Kiel novajara donaco, la reta eldono de Rok-gazet' proponas al ĝiaj legantoj sep MP3-dosierojn, kun po unu kanto el la sep ĝisnunaj diskoj de Kolekto 2000. La reta Rok-gazet' legblas ĉe: <http://www.sciuro.demon.co.uk/rokgazet/>

* — Aperis la unua numero de AmUzE, revuo eldonata de Mariana Evlogieva. Ĝi aperas dumonate kaj temas pri mondo, socio, Esperanto, homo., arto, kreemo, distroj, enigmoj, ludoj, kantoj, anoncoj. Abonprezo: 18 EUR, provekzemplero - 2 IRK. UEA-konto: mrvp-l. Korespondadreso: AmUzE, PK 18, BG-1582 Sofia; Bulgario.

* — Ankaŭ en la jaro 2000, dum la paska semajno, okazos Internacia Junulara Festivalo en Italio. En ĉi okazo estos kunlaboro kun TEJO, subteno de la Eŭropa Junulara Fondado de la Konsilio de Eŭropo, festivalo kaj seminario, malaltaj kotizoj (inter 52 kaj 170 eŭroj), repago de vojaĝkostoj, riĉa programo, apud Venecio. Kontaktadreso: Manuel Giorgini; S. Polo 606; IT-30125 Venezia; Italio. <ijf.admin@esperanto.it> Rekta aliĝo: <http://www.esperanto.it/ijf24/ijf24.html>

* — Prepare al la jordanian antaŭkongreso de la 85a UK, la vicprezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti, vizitis Amanon, la ĉefurbon de Jordanio, inter la 15a kaj 17a de novembro, kiel persona gasto de la ministro pri edukado, Faisal Al-Refou'h.



Libroservo de HEF

Apartado 119

47080 Valladolid

Tel: 983-26-00-86

Helpo

Post la teruraj inundoj okazintaj en du sinsekvaj jaroj en la baseno de Yangtzi-rivero, s-ano Wang Xigen, delegito de UEA en Ĉinio, petas materialan kaj financon subtenon por konstruo de nova lernejo "Espero". La help-konto en UEA estas "xwan-q". La adreso por informi pri la donaco: Foreign Affairs Office of Chizhou; CN-247100 Guichi Anhui; Ĉinio; faksilo: 86-566-202-4488

HEF-Bulteno n-ro 344

Manifesto 2000

*por kulturo de paco kaj
senperforto*

Konsciante pri mia parto de respondecado antaŭ la estonteco de la homaro, kaj tute aparte antaŭ la hodiaŭaj kaj morgaŭaj infanoj, mi devontigas min en mia ĉiutaga vivo, mia familio, mia laboro, mia komunumo, mia lando kaj mia loĝ-loko:

— respekti la vivon kaj la dignon de ĉiu homo sen diskriminacio aŭ sen antaŭjuĝoj;

— praktiki aktivan senperforton, rezignante pri perforto en ĉiuj ĝiaj formoj: fizika, seksa, psikologia, ekonomia kaj socia, precipe rilate al la plej malriĉaj kaj la plej vundeblaj kiel infanoj kaj adoleskuloj;

— kundividi mian tempon kaj miajn materialajn rimetojn, praktikante malavarecon por haltigi forpuŝadon, maljustecon kaj politikan kaj ekonomian subpremon;

— defendi la liberecon de esprimado kaj la kulturalan malsamecon, ĉiam favorante aŭskultadon kaj dialogon kaj ne cedante je fanatikeco, mensogado kaj malakcepto de aliaj homoj;

— favori respondecan konsumadon kaj evoluon, kiuj konsideras la gravecon de ĉiuj vivo-formoj kaj konservas la ekvilibron de la naturo sur nia planedo;

— kontribui al la evoluo de mia komunumo, kun plena partopreno ankaŭ de virinoj kaj kun respekto de la demokratiaj principoj, cele al kuna kreado de novaj formoj de solidareco.

el GK de UEA

—19

Forlasis nin

S-ro Jesús Raposo Montero forpasis en Valencio, 81-jara, la 16an de decembro 1999. Li naskiĝis la 30an de oktobro 1918 en La Estrada, Pontevedra. Li esperantistiĝis komence de 1972. Post lia emeritiĝo, en 1990, li komencis tre ege aktive labori por Esperanto. Li estis profunda idealisto kaj homaranisto kaj ĉiama ekzemplo de laboro kaj sindonemo por la hispana movado. Ekde la UK de 1993 en Valencio la kongresanoj de la diversaj UK-oj ricevis kune kun la kongresa dokumentaro liajn verkojn, broŝurojn, bildkartojn, algluaĵojn, ktp, ĉiam donacitajn de li senpage.

El liaj eldonaĵoj menciindas:

En Esperanto (originale verkitaj en hispana lingvo kaj poste tradukitaj): “Manifesto por la Paco” (verse kaj proze); “Universala Alvoko”; “Supren la Homaro”. Originale en Esperanto: “Tri tutmondaj proponoj”; “Homo, homaro, kreanta naturo. La Tri Fundamentoj”; En hispana lingvo: “Poema de la Creación y del Destino” (Poemo de la Kreado kaj de la Destino); “Manifiesto por la Paz” (Manifesto por la Paco).

Danke al liaj klopodoj, la Fakultato de Filologio de la Universitato de Valencio komencis organizi oficialajn kursojn de Esperanto, kiuj jam okazas dum 4 sinsekvaj jaroj, en kiuj ĝis nun aliĝis preskaŭ 400 gelearnantoj.

S-ro Raposo estis senlaca laboranto por la Paco kaj por nia Interna Ideo, kaj atingis grandan respekton kaj admiron de ĉiuj kiuj konis lin, en kaj ekster la movado, inter alie de la universitataj kaj kulturaj instancoj.

20—

Komuniko de la Akademio

La estraro de la Akademio de Esperanto informas, ke la servo “Konsultejo de la Akademio” estas je ilia dispono por solvi lingvajn dubojn en mallonga tempo.

Se vi havas problemojn pri nomado de novaj aĵoj/aferoj, se vi havas dubojn pri la signifo de difinitaj vortoj au se vi volas klarigojn pri difinitaj punktoj en la gramatiko de Esperanto, ne nur verbu tutsola, sed sendu mesaĝon au leteron al la gvidanto de la Konsultejo: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanujo; retadreso: maul@newsfactory.net

Vi ricevos respondon de la plej spertaj lingvo-uzantoj.

Akademio de Esperanto, La estraro

Ĉe sia forpaso li estis, jam de kelkaj jaroj, Vicprezidanto de Grupo Esperanto de Valencio. La 22an de decembro okazis solena meso en la preĝejo San Isidoro de Valencio, memore al li, kun ĉesto de multaj esperantistoj.

Augusto Casquero

* La 21an de julio forpasis 97-jara Josep Gispert Lluch (EM1980).

* La 19an de decembro forpasis Nicolás Muñiz Alonso (OM 2855), de Avilés (vd la raporton en la rubriko “Niaj grupoj kaj Asocioj”).

* En julio-99 forpasis en Valencio Félix Navarro Clemente (OM1405).

HEF-Bulteno n-ro 344

Hispano elektita!

Korea budaisma lernejo serĉis Esperantisto-studenton por lerni la korean lingvon kaj instrui Esperanton. Venis ok aliĝintoj el ok landoj kaj oni decidis favore al la kandidato el Hispanio: s-ro Rubeno Fernandez Asensio, kiu plenkoste lernos la korean lingvon en Wonkwang Universitato kaj instruos Esperanton en la centro de ŝonbulismo de marto ĝis decembro de 2000.

CHOE Taesok

Nia samideano Rubén, el Badalona, prezentas sin tiel: "Saluton, mi estas esperantisto de antaŭ unu jaro kaj duono. Mi estis elektita por instrui Esperanton en Koreujo dum unu jaro en privata budaisma lernejo, tute senpage. Por mi Esperanto ja estas utila lingvo, kaj ne la angla! Pri tio, legu la numeron de Oktobro de 1999 de la gazeto "Eventoj".

Rubén Fernández



Dum vojaĝo kun sia fianĉino al Malto, s-ano Hector Barca vizitis la universitaton en kiu li trovis straton kun la nomo "Triq l-esperanto" ("Strato Esperanto")

HEF-Bulteno n-ro 344

»» VIAJE ««

Idioma de viaĝe



Uno de los grandes problemas que podemos encontrar al salir de nuestro país es, invariablemente, la lengua. Si el dominio del inglés no es fluido podemos encontrarnos con dificultades.

en el lugar de destino, e incluso en caso de hablar inglés, hay países en los cuales no se utiliza.

Cierto es que, el castellano es un idioma con el cual podemos movernos con bastante facilidad por toda América, y que, gracias al inglés, nos entenderemos con la mayoría de europeos. Pero existe un idioma que no tiene país, que nació y fue concebido para ser utilizado por una comunidad de nivel global: el esperanto.

Pese a todo, solo un millón de personas en todo el planeta hablan esperanto, el cual extrae su gramática y vocabulario de diferentes lenguas naturales. El esperanto es una de las lenguas más fáciles de aprender y utilizar ya que está pensada para una comunicación global. Sin excepciones gramaticales y con una estructura sencilla y flexible se presenta como una herramienta muy válida para el acercamiento de los pueblos por encima de las diferencias culturales existentes.

Esperanto, federación española
www.esperanto-es.org/

Denove!

Nia montrofenestro daŭre allogas profesiulojn de ĉiaspecaj amaskomunikiloj.

Samideano Leandro Trujillo sendis al ni eltondaĵon el la revuo "Arrakis" —servilo de interneto—, Num. 3, decembro 1999, paĝ. 37, kiu bone informas pri la TTT-paĝaro de HEH (vd. supre).

Tagon post tago oni rimarkas kiom trafa estis la investo. Sed ni ne estu naivaj, nia paĝaro devas esti daŭre aktualigita!

Miguel Gutiérrez



Premio Klara Silbernik

Francisca Jimenez Valenzuela

Ĉi tiu premio, estimata samideanino Francisca, celas rememori kaj honori la personecon de Klara Silbernik, edzino de d-ro Zamenhof, kaj en ĝi ni vidas la subtenon, kiun la edzo konstante ricevas de sia edzino. Tamen, kelkaj homoj opinias ke ĝi simbolas tute simple la submetiĝon de la edzino al edzo. Kion vi pensas pri tio?

Mi nur povas diri al vi ke mi kaj mia edzo havas saman opinionon. Ni konsideras nin kun samaj rajtoj, kio donas al ni grandan interkompreniĝon. Do, ni alte taksas la helpon de s-ino Klara Silbernik al sia edzo kaj reciproke mi povas diri.

Kiam en la geedza paro ekzistas interkompreno, pri kio ajn, estas nediskuteble, ke la feliĉo regas en la hejmo. Ĉu vi pensas, ke Esperanto alportis al via hejmo plian feliĉon?

Mi pensas, ke Esperanto alportis feliĉon al nia hejmo. Kiel dirite, feliĉe nia interkompreniĝo estas perfekta kaj en tiu bona etoso mi ankaŭ kalkulas lian kaj mian laboron por la E-movado.

Kara samideano Platas, mi jam scias pri via helpemo kaj laborado en la iama Madrida Esperanto-Liceo, ĉu vi pensas, ke sen la helpo de via edzino, via agado en la Liceo estus estinta la sama?

Estas evidente ke, sen la helpo de mia edzino, mia laboro, mia dediĉo al la E-movado en la sino de MEL estus estinta tute alia. Nenia riproĉo estis inter ni pri tiu mia agado en nia antaŭa Liceo. Mi ripetas, kiam estas interkompreno kaj amo, neniam "oni kontrolas" kiu helpas al kiu.

Iom post iom la virino akiras sian emancipiĝon, kaj ĝuste tion celas la Premio Klara Silbernik, meti la virinon samrangen kun la viro. En tiu stadio de la ĉiutaga kunvivado, ĉu vi povas rakonti al ni iun anekdoton de via E-a kunvivado?

Pro mia laboro, mi multe vojaĝis kaj mi konstatis la bezonon de lingvo internacia. En unu el tiuj vojaĝoj mi konis mian edzinon, en Valdepeñas kaj post tri gefianĉaj rilatoj ni geedziĝis. Hodiaŭ ni havas tri gefilojn: du virinojn kaj unu viron. Mia scio pri Esperanto estis pere de la ĵurnalo

España de Tanger el la tiel nomata malalta Andaluzio. Poste mi aliĝis al MEL, kie mi estis kasisto.


Ni travivas specialajn cirkonstancojn de nia ĉiutaga vivo. Venas la nomata progreso de la scienco kaj la tekniko, do la kunlaborado de virino kaj viro estas tute necesaj en ĉiuj aspektoj de nia moderna vivo kaj precipe por ni esperantistoj en la lingva problemo. La demando estas: Ĉu tiu kunlaborado ŝultro ĉe ŝultro inter geesperantistoj estas tute necesa?

Estas tute necesa la kunlaborado inter geesperantistoj, alimaniere Esperanto ne progresos kaj se tiu kunlaboro okazas inter geedzoj, kiuj bone interkomprenas sin, la rezulto ne povas esti alia ol kontentigaj fruktoj. Kaj mi instigas ĉiun edzinon helpi sian edzon en ĉiu tasko por Esperanto, kaj mi ankaŭ povas diri male, ke ĉiu edzo helpu sian edzinon ĉu por Esperanto aŭ en alia sfero de la vivo.

Mi ne scias kiom longe vi estas geedzoj, sed mi volas vin demandi: Ĉu Esperanto ne estis kvazaŭ flago, kiu subtenis almanaj parte vian geedziĝecon?

Ni jam festis la kvardek jaran datrevenon de nia geedziĝo kaj ni estis kaj estas tre feliĉaj. Kompreneble, Esperanto plifortigis nian kunvivadon dum tiuj kvardek jaroj, kaj varme ni deziras, ke daŭre ekzistu tiu interkompreno inter ni. Ĉu mi helpas lin, Ĉu li helpas min, kun la certeco, ke kiun ni vere helpas estas Esperanto.

Intervjuis Luis Serrano



ABONU KAJ ABONIGU

EL POPOLA

ĈINIO

Abontarifo por 2000

5.792 ptoj

12 numeroj jare. 52 paĝoj ĉiunumere. Informoj pri la E-movado tra la mondo. E-rubrikoj. Aktualaj raportoj kaj artikoloj pri Ĉinio.

Sendu poŝtmandaton al Felix Gómez Martín
c/ Corbeta 8, 5A; 28042 Madrid; Tel: 91-7472378

aŭ al via kutima peranto



Lingva angulo

LINGVA ANGULO 10

de Antonio Valén

ESPERANTO, VIVANTA
LINGVO: LEKSIKA EVOLUO.

Foje ni, esperantistoj, devas frid-kape elteni kretenaĵojn kontraŭ nia lingvo el la buŝoj de simplaj nesciuloj. Jen tipa eldiro: “Esperanto estas artefarita, kaj ĝi do estas mortinta lingvo”. Malgraŭ tia opinio, nenio vere artefaritas en esperanto, ĉar ĝi ja kombinas elementojn kaj strukturojn el diversaj lingvo-familioj, sed evitas ties balastan pezon fonetikan, morfologian kaj sintaksan. Esperanto ne estas artefarita kontraste kun la naturaj lingvoj, sed nur lingvo pli simpla kaj same natura: kaj esperanto kaj la hispana estas lingvoj kreitaj kaj parolataj de homoj, ne de maŝinoj; kaj esperanto kaj la hispana prenis sian vorto-stokon el antaŭaj idiomoj.

Ni bezonas bonan kontraŭargumentadon. Ni vidu do: “vivanta lingvo” signifas nenion alian ol “uzata lingvo”, kaj “mortinta lingvo” signifas nur “ne plu uzata lingvo”. Laŭ tiu ĉi difino, evidentas, ke esperanto estas same vivanta lingvo kiel la hispana. Tamen mi volus aliri pli larĝan temon, nome la fakton, ke nia lingvo nedubeble evoluadas, same kiel ĉiuj homaj idiomoj.

Verŝajne, kelkaj homoj pensas, ke esperanto estas la plej konservativa el la homaj lingvoj, kvazaŭ ĝi sidus katenita ene de rigida vesto, kiu malhelpas plej etan movon. Tia ideo konsistigas gravan eraron, ĉar dum la lasta jarcento, esperanto evoluis *pli ol la hispana*. Mi pruvos mian aserton en

la nuna kaj en la venont-numera *Lingvaj Anguloj*.

Se esperanto ne estus jam de la komenco evolu-pova, ĝi neniam akirus la rangon de vivanta lingvo, sed simple plu restus unu el la ceteraj naŭcent dek unu konataj plan-lingvaj projektoj (Duliĉenko, 1990). Zamenhof donis nur la bazon en sia *Fundamento de Esperanto* (1905/1963) —verko vere kerna por kompreni la postan disvolvigon de nia lingvo— kaj li intence metis la pluan evoluadon kaj perfektigon en la manojn de la parolantoj.

La neologismoj, t.e. la novaj vortoj, principe ne anstataŭas la jam ekzistantajn, sed nur apudestas ilin; tamen la tempo-paso helpas, ke unu el la diversaj formoj —la tradicia aŭ la nova— nature superatutas la alia(j)n. Tamen nia lingvo ankoraŭ tro junas por havi verajn arkaismojn, krom eble dudekon da vortoj (Hauptenthal, 1973: 12-14).

La evidenta pruvo, ke esperanto leksike (= vorto-stoke) evoluis, estas la **kresko de la vortaro**. En 1887, la lingvo naskiĝis kun 904 radikoj, sur kiuj oni povis formi minimume 5.000 *verajn vortojn*. La nun plej granda esperanta-esperanta vortaro, nome *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) (Waringhien k. a., 1987) enhavas ĉirkaŭ 16.200 kapvortojn-radikojn, sur kiuj oni formas proksimume 41.000 *verajn vortojn*. Se ni

aldonas la du bonajn glosarojn de nelogismoj (Cherpillod, 1988; Vatré, 1989) kun po 6.800 kaj 2.000 kapvortoj, ni atingas totalon de 25.000 kapvortoj-radikoj kaj ĉirkaŭ 63.000 *veraj vortoj**, se ne alkalkuli la multegajn sciencajn kaj fakajn terminojn de alia cento da vortaroj (kies kvalito bedaŭrinde tre varias de libro al libro).

Mi parolas pri “veraj vortoj”, ĉar la karakteriza aglutinemo de esperanto aperigas samfamiliajn vortojn sub unu sola kapvorto, nome la familio *amik'o*, *amik'a*, *amik'ec'o*, *amik'ig'i*, *mal'amik'o*, *mal'amik'a*, *mal'amik'ec'o*, *mal'amik'ig'i*, ktp aperas vortare ene de la radika kapvorto *amik*, kontraste kun ties hispana ekvivalento, ĉiam disa tra la vortaro (*amigo*, *amistoso*, *amistad*, *amistar*, *enemigo*, *enemistad*, *enemistar*, ktp).

La leksiko komencis riĉiĝi kiam la parolantoj kaj la vortaristoj ekrimarkis **mankojn en la radikaro** kaj iom post iom korektis ilin, kutime por eviti tro longajn kunmetaĵojn. Ekzemple *metal-fadeno* (“*hilo de metal*”) cedis al *drato* (*alambre*); *vagonaro* (“*conjunto de vagones*”), al *trajno* (*tren*); *malsanulejo* (“*lugar adecuado para enfermos*”), al *hospitalo* (*hospital*); *hom-levilo* (“*aparato para elevar personas*”), al *lifto* (*ascensor*) ktp.,

kvankam ne malofte la primitiva formo plu vigladis (Wells, 1989: 56-57).

Foje du **kunfluaĵ formoj** specialigis, nome *plaĝo* pensigas pri turisma ban-loko kaj *strando* povas esti senhoma sabla marbordo (Wells, 1989: 62).

Ankaŭ okazis **semantikaj ŝanĝiĝoj** (= signifo-ŝanĝiĝoj). Ekzemple *ami* fariĝis *ŝati* kaj *ŝati* fariĝis *aprezi*. Por esprimi nian ŝaton al io per klasika esperanto, ni devus diri *ami*, nome *Mi amas ĉokoladon* = *Me gusta el chocolate*, sed la karambolo kun la signifo *ami* = *amar* (*Mi amas virinon* = *Amo a una mujer*) igis, ke la unuan subsignifon ekkovris *ŝati*. Hodiaŭ preskaŭ ĉiuj diras *Mi ŝatas ĉokoladon* = *Me gusta el chocolate*. Rezulte, la klasikan signifon de *ŝati* alprenis la neologismo *aprezi*: *Mi tre aprezas vian amikecon* = *Valoro mucho tu amistad*.

La vortoj por **novaj realaĵoj** povas ja aperi sub pluraj formoj. Dum la sesdekaj jaroj estiĝis almenaŭ kvar vortoj por la hispana *ordenador*: *komputero*, *komputatoro*, *komputoro* kaj *komputilo*. Nur la du lastaj fakte uzatas nuntempe: *komputoro* estas semantike pli strikta, kaj *komputilo*, pli ĝenerala kaj multe pli ofta.

La siglo por la malsano, kiun ni hispane nomas *sida* (en esperanto: *akirita imuno-deficita sindromo*) adaptiĝis sub



pluraj formoj, sed nur du ankoraŭ supervivas: *aideso* kaj *aidoso*. Kvankam *aideso* estas la propono de la PIVA Suplemento, ŝajnas, ke la formo *aidoso* (nome *a-i-do-so*, t.e. “*a-i-de-ese*”), pli logika, iom post iom venkas.

Dum la historio de esperanto ĉiam interbataladis du fortegaj tendencoj: *skemismo* kaj *naturalismo*.

Skemismo klopodas maksimume profiti de la internaj ebloj de la lingvo. Tial, ke la afiksa sistemo (-ej-, -ad-, -ec- ktp.) permesas al ĉiu lernanto ekspluati malgrandan nombron da radikoj, skemistoj volonte utiligas konatajn radikojn kombinitajn kun afiksoj por esprimi la novajn konceptojn anstataŭ krei neologismojn. Ekzemple: *malsanulejo* prefere al *hospitalo*.

Kontraste, la partianoj de **naturalismo** tre emas ekuzi internaciajn radikojn kaj ne hezitas krei neologismojn kiam necese, surbaze de la dekkvina regulo de la *Fundamento***.

Ekzemple: *hospitalo* prefere al *malsanulejo*.

Neniu el ambaŭ tendencoj absolutas: skemismo ja ne enkonkigiĝas kontraŭ neologismoj, kaj naturalismo certe ne ignoras la genian afikso-sistemon. Evidente, la vorto-stoko kreskadis (kompreneble surbaze de la naturalisma principo), kaj la skemistoj devis serĉi kompromisan solvon: la hodiaŭa esperanto —ja ne povus esti aliel— sintezas ambaŭ tendencojn. Naturalismo iom devancas skemismon en la skriba lingvo, ĉar la diversaj aŭtoroj proponadas novajn formojn, kiujn beletraj legantoj lernas kaj konas. Ĉar ne ĉiu *konanto* estas *uzanto*, en la parola lingvo la skemisma principo klare superregas. Probable, homo, kiu skribas *frida* (*frío*, -a; neologisme) en beletra verko, senprobleme

diras *malvarma* (*frío*, -a; tradicie) dum konversacio.

Esperanto disponas abundon da **fvortoj**. De kiam la granda Peneter lanĉis sian superban sonetaron en 1931 (Peneter, 1931/1989), oni neniam ĉesis uzi ilin: tion klare pruvas du simpatiaj vortaroj pri fvortoj kaj insultoj (Corsetti k. a., 1987; Alos-Velkov, 1991).

Fine, mi ne povas ne menci **esperantismojn** kiel evidentan pruvon de leksika evoluo en nia lingvo. Esperantismoj estas vortoj, kiuj ekzistas nur en esperanto —kompreneble ne alkalkulante la tre malmultajn apriorajn formojn: *kiel*, *tiel*, *kiu*, *tiu* ktp.— Jen tri ekzemploj: 1) *adasismo* (el la sufiksoj *-ad-* + *-as*): facila rimo el la sufiksoj, estetike vere misa; 2) *krokodili* (*cocodrilear*, *hacer el cocodrilo*): paroli en la gepatra-lingve en esperantista medio (variaĵoj kun novaj nuancoj: *aligator*, *kajman*); 3) *kabei*: agi kiel Kabe (konata kaj aktiva samtempulo de Zamenhof), kiu forlasis la esperanto-movadon subite kaj senaverte.

Notoj:

* Por komparo: la Vortaro de la Hispana Reĝa Akademio (DRAE) enhavas proksimume 83.300 kapvortojn, kaj la *Diccionario actual de la lengua española* (DALE) de la eldonejo VOX, ĉirkaŭ 95.800.

** La 15a regulo: La tiel nomataj vortoj “fremdaj” (= internaciaj), t. e., tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, ne ŝanĝiĝas en esperanto, tamen alprenas ties ortografion kaj finaĵojn (Zamenhof, 1905/1963).

Cititaj verkoj:

—H. Alos kaj K. Velkov, *Tabuaj vortoj en Esperanto*, Vraca, 1991

—A. Cherpillod, *Nepivaj vortoj*, Nanterre, eld. de la aŭtoro, 1988.

—R. Corsetti k. a., *Knedu min, sinjorino! Tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto*, Pierrefitte, La Kancerklinikoteko, 1987

—A. D. Duliĉenko, *Mezdamarodnye uspomogatel'nye jazyki*, Tallinn, Valgus, 1990.

- R. Haupenthal, "La arkaismoj en Esperanto", *Literatura Foiro*, n-ro 19, 1973, p. 12-14.
- P. Peneter, *Sekretaj sonetoj* (1931), Budapeŝto, Hungara Esperanto-Asocio, 1989 (3a eld.).
- H. Vatré, *Neologisma glosaro*, Saarbrücken, Artur E. Iltis, 1989 (3a eld.).
- G. Waringhien k.a., *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV) (1970), Parizo, Sennacieca Asocio Tutmonda, 1987 (4a eld., kun suplemento).
- J. Wells, *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* (1978), Roterdamo, Universala Esperanto-Asocio, 1989 (2a eld.).
- L. L. Zamenhof, *Fundamento de Esperanto* (1905), Marmande, Éditions Françaises d'Espéranto, 1963 (9a eld.).

Polemiko pri la Premio Klara Silberniki

Laŭ mia opinio Miguel Gutiérrez pravas en la artikoleto de Boletín n-ro 342 titolita "Ĉio havas sian *sed* kaj *se*". Li skribis: "La hispana movado silentemas kaj kvankam onidire *silento estas konsento*, mi preferas etosan pli viglan, pli vivan".

Vere estas preferinde polemiko, kontrasto de malsamaj opinioj, kritikoj, ol la silento de la apatiuloj; sed la polemiko aŭ kritikoj ĉiam devas havi la limojn de la bona edukado, sen akreco; ĉiam oni povas esti kontraŭ opinioj, sed ne vundante la personajn memrespektojn.

Pro tio mi petas senkulpigon al Jorge Camacho, ĉar mi pensas ke li en la artikolo "HEF pli bone, dankon", li ŝajnas elefanto enirante en kristalvendejon. Camacho estas kontraŭ la renovigita aspekto de Boletín; li kritikis "la ridindan nomon en la hispana *Boletín*", li trovas malglataĵojn ortografiajn,

lingvajjn, stilajn, kaj enhavajn en esperanta kaj hispanlingva tekstoj de broŝureto speciale verkita por Expolingva. Li estas kontraŭ la vortoj "movado", "esperantisto", "propaganda", "artificial" kaj "universal". Ankaŭ li mallaŭdas la "eksteran aspekton aŭ bildon aŭ prezenton de HEF antaŭ la socio". Li finas la artikolon kritikante la Premion Klara Silberniki. Li skribis "absurdas kaj hontindas premii virinon pro tio, ke *ŝi iam estis flanke de sia edzo, kiun ŝi plene apogis*. Camacho opinias ke "estus multe pli pozitive aljuĝi premion al la plej aktiva virino en Hispanujo el la vidpunkto de esperanto, kaj pro ŝiaj propraj meritoj."

S-ro Marco Botella prave, en respondo al Jorge Camacho, skribas "nur ne eraras tiu, kiu nenion faras". Mi volas demandi al s-ro Camacho: se vi konsideras ke virino devas esti premiitaj pro propraj meritoj, kial vi ne organizas kaj disdonas ĉiujare tian premion?

la saman demandon mi faras al Ana Manero. Ŝi skribis "la premio laŭ sia naturo, esence maljusta, por la ricevinta virino kaj por ŝia edzo", "aljuĝu la premion al homo (viro aŭ virino), kiu pro siaj agoj ĝin meritas".

Vere, estas pli facile opinii aŭ kritiki ol agi.

Martí Guerrero

* * *

Ĉar ne plu alvenas leteroj kun novaj argumentoj, ni metas la finan punkton al ĉi polemiko, sur la paĝoj de Boletín, per la publikigo de ĉi letero. Kompreneble, pli rekta debato eblas en la areno de la venonta Hispana Kongreso.

MGA

Esperanto en vortaroj kaj verkaroj


En la ĵus aperinta du-volumega “Diccionario del Español Actual” (eld. Aguilar), pli konata kiel “el Seco” (pro Manuel Seco, unu el la tri ĉef-aŭtoroj), ĉiun vorton akompanas unu aŭ pli da citoj, kiel en PIV, prenitaj el ĵurnal-artikoloj aŭ el verkoj de gravaj aŭtoroj kaj ĉiam kun preciza referenco pri la fonto, malkiel en PIV. Por “esperanto” (difinata, cetere, kiel “idioma internacional convencional [etc]”: aplaŭdinda adjektivo) aperas cito el la ĵurnalo “ABC”: “El esperanto es un idioma que puede aprenderse en dos o tres meses tan solo”. Kaj por “esperantista”, vorto kun du subsignifoj, jen eroj el la ĵurnalo “La verdad” de Murcia (“Este pequeño chestano, camino del colegio, sabe saludar al estilo esperantista”; la sama frazo retroveblas sub “chestano”), el “ABC” (“En España hay unos mil quinientos esperantistas”) kaj el la verko “Parábola del naufragio” de Miguel Delibes (“El grupo esperantista se reunía todos los jueves a las ocho de la tarde”).

Eble oni povus sendi al la aŭtoroj de la vortaro aliajn fragmentojn el la plumo de konataj verkistoj hispanlingvaj. Krom la kanton “La torre de Babel” (de Los Enemigos, 1990, sed kantata ankaŭ de Siniestro Total en “Cultura Popular”, 1997: “¡Qué bien canto en esperanto!”), mi memoras, ke mi trafis tiujn du vortojn en la

romanoj “Niebla” de Miguel de Unamuno, “El túnel” de Ernesto Sábato kaj “Rayuela” de Julio Cortázar (kie legeblas ankaŭ pri la meksikia revuo “Renovigo”). Sed mi malhavas nun tiujn librojn kaj do ne povas trovi la precizajn font-indikojn. Ĉu iu pretas helpi pri tiuj kaj pri aliaj titoloj, sendante la referencojn al “Boletín”? Ekzemple, Eduardo Haro Tecglen, en “El País”, plurfoje uzis ne nur “esperanto” sed ankaŭ “volapuk”.

Sekvu nun freŝa kontribuo, el la novelo “El castillo de la carta cifrada”, de Javier Tomeo, en eldono de Anagrama, p. 93: “¿No le parece que acabaría imponiéndose un indiscutible esperanto, capaz de comunicarnos a todos sin necesidad de más diccionarios?”. Kaj jen ni revenis al la komenco, al la vortaroj.

Jorge Camacho Cordón



Jen aperis

Jen la listo de libroj lastatempe aperintaj kaj senditaj de la respektivaj eldonejoj al HEF. Ili apartenas jam al la Biblioteko Juan Régulo.

* **Australia Felix** *Noveloj*. Trevor Steele (1940). Vieno: IEM, 1999. 132 p. ISBN 3 901752 15 3. 23 cm. noveloj el la ĵusa pasinteco kaj nuno de Aŭstralio, aborigena kaj blankula.

* **Promeso en obskuro** *Noveloj*. Manuel de Seabra (1932). Vieno: IEM, 1997. 110 p.

ISBN 3 901752 07 2. 23 cm. Historioj pri amo aĉetebla kaj ties implikoj sociaj kaj ekonomiaj.

* **Lito apud la fenestro** Betty Salt (1907—94). Ilustraĵoj de F. L. Veuthey. Rotterdam: UEA 1999. 108p. ISBN 92 9017 068 9. 21cm.. Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj de kanada instruistino. Kun kelkaj tradukoj.

* **Paĉjo, kio estas rasismo?** (1997). Tahar Ben Jelloun (1994). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Rotterdam: UEA 1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8. 21cm. Dialogo inter patro kaj filino. La originalo de la maroka Goncourt-laŭreato fariĝis furoraro en Francio.

* **Por aktiva lingvopolitiko** Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81a UK de Esperanto, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller, Rotterdam: UE 1999. 72p. ISBN 92 9017 062 X. 21cm.

* **Lingvaj respondoj** Sergio Pokrovskij (1949). Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1999. 78 p. 20 cm. Dek eseoj aperintaj, reage al demandoj de legantoj, en la revuo Ruslanda Esperantisto.

* **75 jaroj** Willian Auld (1924). Intervjuis kaj redaktis Aleksander Korĵenkov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 47 + 8 fotopaĝoj. 20 cm. Aŭtobiografio, trideko da poemoj, bibliografio.

* **Maigret hezitas** Krimromano (1969). Georges Simenon (1903—89). El la franca tradukis Daniel Luez. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 128 p. 20 cm. Mondfama pariza komisaro enketas unuafoje en Esperanto.

Donacita de Serbia E-Ligo

Rakontoj el la naciliberiga batalo de jugoslavijaj popoloj (Elektis kaj tradukis Antonije Sekelj) Beograd-1956.



Survoje

Jen la titolo de la 8a disko de *Kolekto 2000*. La Kompanoj premieris en Esperanto em la UK en Montpellier, kie ili prezentis siajn tipe franc-stilajn kanzonojn al la internacia publiko.

Nun aperas ĝia unua K-disko entenanta nur originalajn kanzonojn, kiuj ebligas al la aŭskultanto ekkoni la vidpunkton de la teamo pri kontraŭrasismo, humuro kaj amo.

Mendu la diskon ĉe la Libroservo de HEF aŭ rekte ĉe la eldonejo: *Vinilkosmo* (12,05 eŭroj plus 3,05 eŭroj por sendokostoj). Memoru ke la kostoj de la tutan *Kolekto 2000* (10 kodiskoj) estas:

Donacita de Sergije Kalĉić

Legendoj pri Hajduko Veljko kaj pri lia naskiĝvilo Lenovac Notoj pri la plej granda kuraĝulo. (Esperantigitaj de Sergije Kalĉić kaj Jadranka Miriĉ) Zaječar-1999.



Rafael Alberti

(1902-1999)

Trad. Miguel Fernández

PARADIZO PERDITA

Tra l' jarcentoj, senĉese,
tra l' nenio de l' mondo,
mi sendorme vin serĉas.

Kaj post mi, nesenseble,
sen ektuŝi min ŝultre,
gvatas morta anĝelo.

Sed, kie l' Paradizo,
dijru, ombro tiea?
Silento post la ĉuo.

Jen urboj sen respondo
fluoj sen vortoj, montoj
sen eĥoj, mutaj maroj.

Neniu scias. Homoj
senmovaj, staraj, rande
de fiksjaj tomboj min

ignoras. Tristaj Birdoj,
kantaro ŝtoniĝinta,
direktoj en ekstazo,

blindas. Nenion scias.
Sen sun', antikvaj ventoj,
inertaj, en la leŭgoj

trairotaj, leviĝas
kalcinitaj, surdorse
falas, dirante pokon.

Diluitaj, sen formo,
la ĉieloj forfuĝas
kun sia kaŝa vero.

Ĉe la fin' de la Tero,
ĉe la lasta Ter-eĝo,
la okulojn glitante,

sen espero mi serĉas
tiun verdan portikon
tra la nigra abismo.

Ho, truego el ombroj!
Ŝpruco-fonto de l' mondo!
Jarcenta konfuzajaĵo!

Ho! Retro! For! Teruras
ĉi tenebro sen voĉoj.
Ho, animo perdita!

—Staru, morta anĝelo.
Kie vi? Eklumigu
viafulme l' revenon.

Silento. Nur silento.
Senmovas la pulsado
de la nokto senfina.

Paradizo perdita!
Perditas, vin serĉante,
mi, senluma por ĉiam.

(El "Pri la anĝeloj")

59 Hispana Kongreso

Loĝado

La organizantoj de la kongreso ne faros rezervejojn por loĝado. Kiel helpo al la kongresanoj, jen listo de sugestitaj loĝejoj:

Hoteloj

Meliá Castilla (****) Capitán Haya 43, Madrid [1], tel. 915675000

Aitana (****) Pº de la Castellana 152, Madrid [1], tel. 913440068

Tryp Centro Norte (****) Mauricio Ravel 10, Madrid [1], tel. 917333400

Grand Prix (**) Ctra. de Burgos, km 16,5, Alcobendas [2], tel. 916524600

Hostaloj

Los Ángeles (***) Artistas 18, Madrid [3], tel. 915330375

Cuatro Caminos (****) Artistas 7, Madrid [3], tel. 915531992

Arba (**) Huesca 37, Alcobendas [2], tel. 916543412

Frontón (**) Ctra. de Burgos km 16, Alcobendas [2], tel. 916523437

Aliaj

Albergue, Santa Cruz de Marcenado 28 [4], 915474532

Camping Madrid, Ctra. N-I Madrid-Burgos, km 11 (salida 10), tel. 913022835

[1] Tre proksimaj de Plaza de Castilla, de kie startas la buso al la kongresejo.

[2] Tute apuda urbeto Alcobendas. Proksimaj bushaltejoj por la kongresejo.

[3] 15 minutojn metroe de Plaza de Castilla.

[4] 30 minutojn metroe de Plaza de Castilla.

Ateliero

La verkisto kaj akademiano Jorge Camacho gvidos verk-atelieron okaze de la Hispana Kongreso, en du tagoj. Interesiĝantoj kunportu al la kongreso siajn poemojn, rakontojn ktp, en provizora aŭ en definitiva formo.

Tutmonda kulturo

Muziko, novaj libroj, poezio, interreto, literaturo, studado, scienco, kunsido, atelieroj, humoro, internacia kunlaborado, komputado, astronomio, debato, naturo, ekonomio... kaj pli!

Atentulo!

Eblas iri de Madrido al San Sebastián de los Reyes per la buslinio numero 154C, kiu ekiras de Plaza de Castilla. La vojaĝo daŭras 35 minutojn.



59a Hispana Esperanto-Kongreso

San Sebastián de los Reyes (Madrid),
29a de aprilo—1a de majo 2000
Kongresejo:
Centro Rosa Luxemburgo
C/ Federico García Lorca s/n

ALIĜILO N-RO.....

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj
 Antaŭnomo:
 Naskiĝdato (2) HEF-numero
 Adreso
 Poŝtkodo
 Urbo telefono
 Retadreso faksilo
 (2) Nur por statistiko

Kongreskotizoj en eŭroj: ĝis la 1a de marto poste
 HEF-ano 30 39
 Ne HEF-ano 36 45
 Juna HEF-ano 21 27
 Juna ne HEF-ano 27 33
 Donacon
 ENTUTE:

Kotizu pere de Caja Postal, konto-numero: 1302-0116-51-0024189825; aŭ pere de la UEA-konto: hef-m. Poste kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la suba adreso.

Por bankĉekoj kaj poŝtmandatoj aldonu 10%
 LA KOTIZO ESTAS NE REPAGEBLA.

Dato kaj subskribo

Hispana Esperanto-Federacio
 Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7
 ES-28015 Madrid

www.esperanto-es.org
 kongreso@esperanto-es.org
 Telefono kaj faksilo: +34 914 468 079

Daŭre kreskas la nombro

La 3an de decembro 1999 oni inaŭguris en Castelldefels (Barcelono) Esperanto-placon kaj Monumenton al Esperanto, ambaŭ samloke.

Ĉeestis la inaŭguron la urbestro de Castelldefels, s-ro Agustín Marina, kiu alparolis la esperantistaron kaj ceteran publikon. Li diris: “Castelldefels fervore dediĉas ĉi tiun placon kaj monumenton al la E-movado, ĉi tie en la centro de la urbo kaj instigas la praktikantojn de tiu bela Internacia Lingvo al plia kaj plua laborado, ĉar Esperanto estas sinonimo de paco kaj interkompreno.” Je la fino de lia paroladeto, la publiko malavare rekomencis lin per forta aplaŭdado.

Nome de la Fervojistista Asocio kaj la tuta E-movado dankis lin samideano Martí Guerrero.

En tiu bela tago apud la mediterranea maro, ĉirkaŭ 500 homoj, esperantistoj, simpatiantoj kaj sciemuloj, ĉeestis la eventon, kio donis gravan reliefon al la aranĝo.

Samtempe oni ankaŭ omaĝis al bedaŭrata samideano Ramón Fernández Jurado, iama fervora esperantisto, poeto kaj politikisto. Apud la monumento, skulptita sur ŝtono, estas strofo de unu el liaj poemoj, aludanta al Castelldefels kaj al Esperanto.

Luis Serrano

